**ISSN: 0827-3154** **Revuo de Kanada Esperanto-Asocio**

**2009/1** **printempo 2009**

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

# LUMO



# Mez-Kanada Renkontiĝo 2009 okazis en Toronto

*Lumon* eldonas trifoje en jaro KEA, 6358-A rue de Bordeaux, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8
*Lumo* ('light') is published three times per year by the Canadian Esperanto Association
*Lumo* ('lumière') est la revue trimestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO

MeKaRo 2009 en Toronto (K. Price) ..... 3
Ne nur dinosaŭroj (M. Sveda) ..... 4
Financa Raporto de Kanada Esperanto-Asocio 2008 (Y. Bellefeuille) ..... 5
Oficialaj anoncoj:
Serĉataj: kandidatoj por la estraro de Kanada Esperanto-Asocio 2010/2011 ..... 8
Nova dissendo-listo por anoncoj pri la kanada Esperanto-movado ..... 8
Nova dovodo pri Esperanto (Libroservo) ..... 8
Sunfloroj (S. T. Norvell) ..... 9
Ni fenebras: forpasis Janet Warren (A. Simon) ..... 10
Nia enigmo (D. Reble) ..... 11
Solvo de pasint-numera enigmo ..... 12
Recenzo: *In the Land of Invented Languages* de A. Okrent (D. Karthaus) ..... 13
Nova ĉe la Libroservo de KEA ..... 14
Korespondi petas ..... 15
Redaktora angulo ..... 15
Kalendaro:
Regulaj kunvenoj en Kanado ..... 16
Nordamerikaj Esperanto-eventoj 2009 ..... 16

Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 200
Redaktis: Paul Hopkins
Provlegis: Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson
Presis kaj distribuis : Yves Bellefeuille

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

**SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2009, BV. FARI TION NUN!**

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por $30 al

Kanada Esperanto-Asocio
p/a Yves Bellefeuille, kasisto
2372 Haddington
Ottawa (ON) K1H 8J4

## MeKaRo 2009 en Toronto


Ĉi tiu senkotiza esperantista turisma evento okazas dum la feria semajn-fino 'Viktoria', kaj ĉi-jare okazis en Toronto, inter la 16a kaj la 18a de majo, kun partopreno de 31 esperantistoj. Ili venis el 12 urboj de tri landoj por kunveno kiu celas interkonatigi esperantistojn el diversaj urboj kaj ekkonigi al ili la gasturbon.

Sabaton posttagmeze esperantistoj komencis alveni en nia festo-ĉambro. Pro forta pluvo kiu baldaŭ ekfalis, anstataŭ promeni ni restis en la festoĉambro, babilante kun amikoj el diversaj urboj, manĝetante kukon kaj torton de tempo al tempo. La dolĉaĵoj kaj teo kaj kafo estis senpagaj kaj daŭre haveblaj, ankaŭ en la vesperoj de la semajnfino.

Fru-vespere, post ĉeso de la pluvo, Jeremio gvidis ekskurson laŭ la stratoj Carlton kaj College. [En la kovrilpaĝa foto oni vidas la ekskursanojn antaŭ la Ontaria parlamentejo. ndlr] Post la ekskurso, preskaŭ ĉiuj iris al proksima vjetnama restoracio por kune vespermanĝi, dum Detlef restis por bonvenigi eventuale venontajn novajn alvenantojn. La vespera programo, post sinprezento de la ĉeestantoj, inkluzivis esperanto-vortludojn (mensa ekzerco!), prezentitaj de Jogo (Jean-Guy), kaj iom da pianludado de Jeremio.



Ekskursanoj antaŭ la Arta Galerio de Ontario



Partoprenantoj de la ekskurso al torontaj arkitekturaĵoj antaŭ la Reĝa Ontaria Muzeo

Dimanĉe la vetero estis bela, kvankam kun iom malvarma vento. En la mateno iuj kune *brunĉis** en restoracio Daybreak. Aliaj, jam manĝintaj en siaj pensionoj aŭ hoteloj, mem esploris la ĉirkaŭaĵon. Post la manĝo ni rekunvenis en la festoĉambro por dividiĝi en grupojn por fari la elektitajn promenojn/ekskursojn. Iuj iris al 'AGO', la Arta Galerio de Ontario. Aliaj ekskursis kun Skoto piede kaj trame por rigardi konstruaĵojn de arkitektura vidpunkto en la universitata kaj aliaj kvartaloj.

Je la fino de la posttagmezo oni renkontiĝis en la festoĉambro por re-dividiĝi en grupojn, laŭ la manĝaĵ-preferoj. Oni decidis ne iri al diversaj kvartaloj, sed ĉiuj konsentis iri per 20-minuta tramveturo al la hinda kvartalo, por vidi ĝin kaj tie manĝi. Ĉar granda grupo ne povas sidi ĉe unu tablo, ne necesis ke ĉiu iru al la sama restoracio. Tri grupoj formiĝis por iri al tri restoracioj, proksimaj unuj al la aliaj. Unu estis ekskluzive vegetara, unu sudhinda (spicaj manĝaĵoj), kaj unu nordhinda (milde spicitaj). Ĉiuj poste diris ke la manĝoj estis bongustaj.

Vespere, Francisko Lorrain prelegis amuze kaj tre sprite pri 'la problemo pri niaj GEnuoj'(!). Poste ni spektis kelkajn esperant-

---

* *brunĉi* = partopreni malfru-matenan manĝon, dum kiu oni proponas pladojn kaj de la maten-manĝo kaj de la tagmanĝo. [la redaktoro]

lingvajn dovodojn divers-specajn, ĝis malfrua horo devigis nin foriri por dormi. Iuj tiam adiaŭis, ĉar ili devos matene jam ekveturi por longa veturo hejmen. Kelkaj aliaj renkontiĝis je 10h30 lundon matene por manĝi en alia proksima restoracio antaŭ ol reiri al siaj urboj.



Francisko prelegas pri la niaj GEnuoj

Eble io el la programo eskapas mian memoron nunmomente, sed io kion mi nepre ne ellasu estas la invito de Francisko Gauthier veni al Tri-Riveroj (Kebekio) post unu jaro, kaj esplori tiun urbon kiu situas meze inter Montrealo kaj Kebeko, sur la norda bordo de la riverego Sankta Laŭrenco. Li jam komencis organizi MeKaRo-n 2010, kiu okazos tie. Dankon al Jean-Guy Richard pro la fotoj.

— Ken Price

(interpretado de fotoj: Jeremio Bass)

## Ne nur dinosaŭroj

La urbeto Drumheller en la provinco de Alberto, kun loka loĝantaro de 6 500 aspektas simile kiel aliaj okcidentkanadaj urbetoj. Ĝi tamen allogas pli ol duonon de miliono da vizitantoj ĉiujare el multaj landoj, precipe pro la apud ĝi situanta plej granda muzeo de paleontologio en la mondo, pro la unika pejzaĝo, kaj pro pasiaj ludoj de Jesuo Kristo, kiuj pro amplekso kaj mondfameco rivalas al Oberammergau en Germanio.




La nova galerio "Ateliero Verda" de Jacqueline Sveda en Drumheller (Alberto)

En la ĉirkaŭaĵo de la urbo oni trovas dum pli ol jarcento kaj ankoraŭ nun fosiliajn dinosaŭrajn ostojn de multaj specoj. Ĉe la turisma informcentro en la urbocentro troviĝas 46m granda replikaĵo de tiranosaŭro (*Tyrannosaurus Rex*) – la plej granda en la mondo – kiu servas kiel observeja turo.

En la ĉefa strato de tiu ĉi urbeto, meze de kvar jam ekzistantaj artgalerioj, Milan kaj Jacqueline Sveda pasint-jare aĉetis malnovan komercan konstruaĵon por servi kiel ekspoziciejo de artaĵoj de Jacqueline kaj informejo de Esperanto; ĝi portas la nomon "Ateliero Verda" (vidu la bildon). Membroj de Kalgaria Esperanto-Rondo unuanime akceptis okazigi sian someran piknikon precize en ĉi tiu urbeto je dimanĉo, la 2-a de aŭgusto (vidu la kalendaron, pĝ 16). En la urbeto ekzistas grupo de bahaanoj de kiu kelkaj esprimis intereson pri Esperanto kaj akceptis inviton al la pikniko. Oni ankaŭ provos inviti membrojn de malgranda, sed laŭdire aktiva grupo de latin-amerikanoj en Drumheller.

— Milan Sveda

## Financa raporto de Kanada Esperanto-Asocio 2008

KEA havis tre aktivan financan jaron en 2008, kun pluraj grandaj enspezoj kaj elspezoj. Krome estis faritaj ŝanĝoj por meti la financojn de KEA sur pli fortikan bazon.

Steĉjo Norvell, honora membro de KEA kaj de UEA, donacis Libraron Ludovikan al KEA. Ĝi havas pli ol 2000 librojn kaj pli ol 300 registraĵojn kaj estas la plej granda Esperanta libro-kolekto en norda Ameriko. Krome Steĉjo donacis grandan mon-sumon por certigi ke KEA povos bone prizorgi la kolekton. Multajn dankojn al Steĉjo!

Aliflanke, estis granda unu-foja deskribo de la valoro de la stoko de la libroservo, kaj ankaŭ granda falo en la valoro de la fondaĵo ĉe Victoria Foundation.

La deskribo de la valoro de la librostoko okazis, ĉar la valoroj kiuj aperis en antaŭaj raportoj estis kalkulitaj laŭ la vendo-prezoj de la libroj anstataŭ laŭ iliaj aĉeto-prezoj, kiel devus esti. Por korekti tion, okazis deskribo de $4745, kio estas la diferenco inter la vendo-prezoj kaj la aĉeto-prezoj. Tio ne signifas, ke la valoro de la stoko subite falis en 2008, sed ke la valoroj deklaritaj antaŭ 2008 estis tro altaj.

En 2006, la tiama estraro decidis uzi grandan parton de la kapitalo por starigi fondaĵon ĉe Victoria Foundation, instanco en la sam-noma urbo en Brita Kolumbio kiu administras monon por karitataj asocioj. Victoria Foundation tenas la monon kaj investas ĝin por ni; ni rajtas al la profitoj, sed la kapitalo devas resti ne-tuŝita.

La estraro elektita en 2008 zorge studis tiun decidon kaj decidis ne provi ŝanĝi la situacion por la momento. Tamen, en 2008 la investado de tiu fondaĵo ne kaŭzis profiton, sed male perdon de -16,25%, aŭ $6908. La kaŭzo de la perdo estas la konata financa krizo.

Malgraŭ tiu perdo, la long-daŭraj rezultoj de la investado de Victoria Foundation restas bonaj. Eĉ kun la granda perdo en 2008, la mono administrita de Victoria Foundation havis profiton de meze 3,2% jare dum la kvin-jara periodo de 2004 ĝis 2008.

Alia granda elspezo okazis, kiam la estraro donis ne-buĝetitan subvencion de $2000 al TAKE. Aperis multaj informoj pri TAKE en *Lumo* 2008/2, kaj ne estas dubo, ke la aranĝo estis granda sukceso por la kanada movado.

Sekve, kvankam la financa raporto montras perdon de $4246 en 2008, tio ne signifas, ke la kerna agado mem de la asocio estas deficita. Se oni kalkulas nur la normalajn enspezojn (kotizoj, normalaj donacoj, libroservo) kaj elspezojn (*Lumo*, administraj kostoj, pago al UEA), la rezulto estas gajno de ĉirkaŭ $2000. La buĝeto kiu jam estis aprobita por 2009 montras gajnon de $1000.

Por fortikigi la financan bazon de KEA, estis kreitaj du rezervoj, unu por Libraro Ludovika, kaj unu por la dumvivaj membroj.

La kaŭzo de la kreo de rezervo por la Libraro Ludovika simple estas, ke la mono donacita de Steĉjo por prizorgi la Libraron ne estos uzita tuj, sed dum pluraj jaroj; ĝi do estas "rezervata" por tiu celo.

Multe pli granda rezervo estas la Rezervo dumvivaj membroj. Jam aperis informoj pri la dumvivaj kotizoj en *Lumo* 2008/2. Antaŭe, la ricevitaj dumvivaj kotizoj simple aperis kiel normalaj enspezoj. Tio donis malĝustan bildon pri la financa stato de la asocio, ĉar oni ne povis tuj elspezi la ricevitajn dumvivajn kotizojn dum la sama jaro; oni devis male teni ilin dum pluraj

jaroj por kovri la postajn elspezojn.

Tial estis kreita rezervo, en kiu estas sufiĉe da mono por pagi la servojn kiujn ricevos la dumvivaj membroj dum estontaj jaroj. La rezervo estas granda, je $45 000, kaj tion kaŭzas la fakto ke ekster-ordinare granda proporcio de niaj membroj estas dumvivaj: duono de la membroj de KEA estas dumvivaj, kompare kun 15% ĉe UEA, ekzemple.

La kreo de tiu rezervo kaŭzis grandan falon en la deklarita kapitalo de la asocio, de $67 700 al $22 700, sed tio donas pli ĝustan ideon pri la sumo pri kiu ni fakte povas libere disponi, kaj pri kiom da mono ni devas rezervi por la dumvivaj membroj. Kompreneble la diferenco, nome $45 000, ne malaperis; ĝi simple estis metita en rezervon por apartigi ĝin de la resto de la mono.

Yves Bellefeuille (kasisto de KEA)

## Bilanco komence de 2008

| | |
|---|---|
| **Aktivoj**: | |
| Banko | 2 310,17 |
| Konto ĉe UEA | 378,00 |
| Kontoj libroservo | 4 947,29 |
| Antaŭpagitaj elspezoj | 112,84 |
| Fondaĵo ĉe Victoria Foundation | 43 428,66 |
| Librostoko | 16 533,38 |
| **Sume** | **67 710,34** |
| | |
| **Pasivoj:** | |
| Kapitalo | 67 710,34 |
| Rezervo dumvivaj membroj | 0 |
| Rezervo prizorgo libraro | 0 |
| **Sume** | **67 710,34** |

## Spezoj

| | | **rezulto 2008** | **buĝeto 2008** | **buĝeto 2009** |
|---|---|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | | | |
| Kotizoj | | 1 914,50 | 1250 | 1800 |
| El Rezervo dumvivaj membroj | | | | 1800 |
| Donacoj: | | | | |
| - Libraro Ludovika | 7 340,00 | | | |
| - Prizorgo Libraro | 5 000,00 | | | |
| - Por KEF | 115,00 | | | |
| - Aliaj | 2 152,44 | | | |
| Donacoj sume | | 14 607,44 | 1500 | 1500 |
| Fondaĵo ĉe Victoria Foundation | | -6 908,09 | 1000 | 0 |
| Perado de revuoj | | 100,78 | 50 | 50 |
| Libroservo | | 1 595,89 | 0 | 0 |
| Kurzo-diferencoj | | 14,33 | 0 | |
| **Sume** | | **11 324,85** | | |

| **Elspezoj:** | | | |
|---|---|---|---|
| Lumo | 2 454,92 | 3300 | 2400 |
| Pago al UEA | 121,48 | 100 | 130 |
| Administraj kostoj | | | |
| - Kontisto | 700,00 | | |
| - Aliaj | 549,30 | | |
| Administraj kostoj sume | 1 249,30 | 250 | 500 |
| Donaco al TAKE | 2 000,00 | 0 | |
| Subvencioj ARE/NOREK | | | 200 |
| Al rezervoj | 5 000,00 | | |
| Deskribo de librostoko | 4744,65 | 0 | |
| **Sume** | **15 570,35** | | |
| **Gajno (Perdo)** | **-4 245,50** | | |

## Bilanco fine de 2008

| **Aktivoj:** | |
|---|---|
| Banko | 6 938,19 |
| Konto ĉe UEA | 245,08 |
| Kontoj libroservo | 8 065,91 |
| Antaŭpagitaj elspezoj | 33,09 |
| Libraro Ludovika | 7 340,00 |
| Fondaĵo ĉe Victoria Foundation | 35 520,57 |
| Librostoko | 10 322,00 |
| **Sume** | **68 464,84** |

| **Pasivoj:** | |
|---|---|
| Kapitalo | 22 710,34 |
| Gajno | -4 245,50 |
| Rezervo dumvivaj membroj | 45 000,00 |
| Rezervo prizorgo libraro | 5 000,00 |
| **Sume** | **68 464,84** |

Notoj:

- Dum la jaro estis kreita Rezervo dumvivaj membroj. Tiucele parto de la antaŭa kapitalo estis apartigita por krei tiun rezervon.
- En 2006, KEA starigis fondaĵon ĉe Victoria Foundation (VF). VF tenas la kapitalon de tiu fondaĵo por KEA kaj investas ĝin; KEA rajtas ricevi la profiton, sed ne la kapitalon.

  Dum la jaro 2008, la rezulto de la fondaĵo estis -16,25%, aŭ perdo de $6908. La kaŭzo de la perdo estas la konata financa krizo.
- La valoro de la librostoko estis ĝustigita. La valoroj estis antaŭe erare kalkulitaj laŭ vendo-prezoj anstataŭ laŭ aĉeto-prezoj. Tial okazis deskribo de $4745, kaj nun aperas la aĉeto-prezoj. Tio ne signifas, ke la valoro de la stoko subite falis je $4745 en 2008, sed ke la valoroj deklaritaj antaŭ 2008 estis tro altaj.

# OFICIALAJ ANONCOJ

**Serĉataj: kandidatoj por la estraro de Kanada Esperanto-Asocio 2010/2011**

Laŭ la statuto devas esti minimume 5 estraranoj.

Oni povas proponi sin, aŭ alian (kiu konsentas) **nur ĝis la lasta tago de aŭgusto** - sed NE atendu ĝis tiam. Diskutu kun viaj klubanoj, se vi havas lokan grupon, kaj FRUE proponu taŭga(j)n persono(j)n por gvidi la asocion dum la venonta dujara periodo.

Proponojn sendu **al la sekretario de KEA** per poŝto aŭ retpoŝto aŭ alimaniere.

**Retadreso: kenprice13@sympatico.ca**
**Poŝta adreso: Ken Price, 705-40 High Park Avenue, Toronto ON M6P 2S1**

✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰

**Nova dissendo-listo por anoncoj pri la kanada Esperanto-movado**

KEA kreis interretan dissendo-liston por anoncoj pri la kanada movado. La listo estas "filtrita" (aŭ "moderita"), kaj nur mesaĝoj kiuj rilatas al la movado en Kanado akceptiĝas. Aperas ekzemple informoj pri renkontiĝoj, pri kursoj, ktp.

Por aboni, sendu mesaĝon al la ret-adreso < **anoncoj-request@esperanto.ca** >
kun la tem-linio ("Subject") "subscribe", aŭ iru al la hejm-paĝo de la listo:
**http://esperanto.ca/mailman/listinfo/anoncoj_esperanto.ca**

Por sendi mesaĝon al la listo, sendu ĝin al la ret-adreso < **anoncoj@esperanto.ca** >

☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺

## Nova dovodo pri Esperanto! Esperanto estas…

E@I kaj Eldonejo Espero ĵus lanĉis novan dovodon. Jen priskribo kiu aperas ĉe la DVD-ujo: Esperanto estas internacia vivanta lingvo; se vi ne konas ĝin, aŭ kredas ke ĝi ne funkcias, jen filmo por vi! La dovodo enhavas 6 partojn: lingvo taŭga por ĉio, lingvo kun multaj trajtoj, lingvo uzata plur-maniere, lerninda kaj lernebla por ĉiuj, lingvo kun bunta movado kaj fine lingvo de la estonteco.

Spertu la bonan etoson de 'internacia familio', loĝanta ĉie en la mondo, kiu tre ŝatas mult-maniere uzi la lingvon. La filmo estas rezulto de trijara projekto kaj estis kreita en internacia kunlaboro de pluraj filmemuloj. Ĝi plene taŭgas por publika prezento aŭ al viaj amikoj ĉar la dovodo spekteblas kun 20 subtekstaj lingvoj aŭ 6 voĉaj lingvoj (DE,EN,EO,FR,IT,PL).

La libroservo de KEA vendas ĝin por 10$ inkluzive de sendkostoj. Profitu la okazon kaj mendu la dovodon de **Esperanto Elektronike** (5$), kun la plej kompleta materialo pri la lingvo kaj la movado. En ĝi estas kursoj, legaĵoj, vortaroj, kantoj, ludoj kaj ankoraŭ multo pli. Informoj en 20 lingvoj. Valora por profesie prezenti Esperanton. Elektu la kovrilon: Esperanta, English, français.

Sendu mendojn al: **informo@esperanto.qc.ca**

Libroservo de KEA, 6358, de Bordeaux, Montréal (Québec) H2G 2R8

Vizitu: **http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/**



Pentraĵo de sunfloroj far Vincent van Gogh. Dank' al vggallery.com

## Sunfloroj

(el *Inter Ni* n-ro 243, julio 2007)

Ĉe NASK-2006, en la tria nivelo, Katalin Kováts instruis tutan kurson pri la nederlanda pentristo Vincent van Gogh. La baza ideo estis ke ni ne lernis Esperanton — ni studis ion per Esperanto. (Tamen, ne imagu, ke oni rajtis forgesi la akuzativon!) Inter multaj aliaj aferoj, ĉiu studanto prelegis pri io. Ekzemple, Eduardo Kusters, kuracisto el Belgio, prezentis tre interesan analizon pri la probablaj malsanoj de van Gogh. Estis mia tasko prezenti iom da informo pri sunfloroj.

Estas konate, ke la sunfloroj tre logis van Gogh kaj li faris multajn pentraĵojn pri ili. Li skribis: „Eble vi scias, ke la peonio apartenas al Jeannin kaj la rozalteo al Quost, sed la sunfloro estas la mia."

Jen kelkaj aferoj kiujn mi dum la kurso eksciis pri sunfloroj:

### Ĉu ni Elektu la Terminon „Helianto" aŭ „Sunfloro"?

Pri la nomoj de plantoj kaj bestoj, Zamenhof konsilis al ni uzi la sciencan nomon, ekz-e la nomon de la genro, kiam taŭga vulgara nomo ne ekzistas. La genro de la bone konata sunfloro estas *Helianthus*, kaj science la sunfloro estas *Helianthus annuus*. Laŭ PIV, „helianto" kaj „(unujara) sunfloro" estas sinonimoj. La problemo estas, ke ekzistas pli ol 50 specioj de heliantoj, kelkaj el ili interesaj en si mem. Ekz-e, *Helianthus tuberosus* (nomata „terpiro" aŭ „jerusalema artiŝoko") estas ankaŭ „helianto", sed oni kreskigas ĝin por nutri kaj homojn kaj farmbestojn (la manĝebla parto estas la rizomo, kiu estas subtera tigo sur kiu troviĝas la radikoj de la planto).


Do, por eviti konfuzon, mi rekomendas ke ni uzu la vulgaran terminon „sunfloro" por la vaste konata planto kun la granda floro (aŭ pli precize „infloresko" [kunmetita floro]), nome *Helianthus annuus*. La terminon „helianto" ni uzu nur por sunfloro kune kun ĝia aro de parencaj plantoj.

### Kial Sunfloro Turnas Sin al la Suno?

Maturaj sunfloroj ne turnas sin al la suno, nur la nematuraj. Tiu fenomeno, nomata heliotropismo (aŭ suntropismo), troviĝas ankaŭ en aliaj floroj. La stimulo de tiu fenomeno ne estas la lumo sed la ombro. Kiam la parto de la tigo tuj sub la infloresko (aŭ granda kompunda floro) estas en la ombro, la ĉeloj produktas diversajn vegetaĵajn hormonojn, inter ili aŭksinon. Tiu ĉi aŭksino, laŭ PIV, estas ducikla nitrogenhava molekulo nomata „indolacetata acido" (IAA). La aŭksino kaŭzas plilongigon de la apudaj ĉeloj de la planto. En la sunfloro ĝi stimulas plilongigon de la ĉeloj en la enombra parto de la tigo tuj sub la infloresko kaj tiel puŝas la floron al la suno.

**Eĉ pri Sunfloroj oni ne povas eviti Matematikon**

En la mezo de la matura sunfloro ni vidas tion kion ni ofte nomas „semojn". Ili fakte ne estas la semoj mem sed la sekaj fruktoj, nomataj „akenoj". La vera semo troviĝas en la akeno, kiu estas tre simila al ŝelo. Mia sciuro jam scias tion, kaj ĝi ĉiam senŝeligas la semon antaŭ ol manĝi.



Spirala filotakso
Dank' al http://www.christianhubert.com

Ĉu vi iam rimarkis la ordigon de la akenoj en la sunfloro? Estas spiraloj en direkto laŭ la horloĝo kaj estas spiraloj en direkto kontraŭ la horloĝo. Tiu fenomeno nomiĝas „filotakso" (vorto ne trovebla en PIV). Filotakso, la kuriozaĵo pri dudirektaj spiraloj, troviĝas ankaŭ en aliaj plantoj, ekz-e en ananasoj, en strobiloj de la pino, en lekantoj kaj aliloke.

Oni diras, ke Dio estas matematikisto. Por atesti, mi deziras atentigi vin pri la nombro de la spiraloj en ĉiu direkto. Sed unue, pensu pri la nombro-sekvo: 1, 2, 3, 5, 8, 13, 21, 34, 55, 89, 144, 233, ktp.

Rimarku ke 3 estas la sumo de 1 kaj 2; 5 estas la sumo de 2 kaj 3; 8 estas la sumo de 3 kaj 5. Ĉiu nombro en la sekvo estas la sumo de la du antaŭaj nombroj. Tiu estas la fama sekvo de Fibonacci, sekvo kiun matematikistoj (kaj eble ankaŭ Dio) multe amas.

La miraklo estas, ke la nombro de spiraloj en ĉiu direkto estas ĉiam du apudaj nombroj de Fibonacci. Ekzemple, ĉi tie la nombroj estas 55 kaj 89, sed en aliaj sunfloroj kaj aliaj filotaksaj plantoj la nombroj povus esti 13 kaj 21, aŭ 21 kaj 34, aŭ 34 kaj 55, eĉ 89 kaj 144.

Jen profunda mistero pri la reguloj de kreskado en naturo. Jen mirinda Esperantokursaro en Brattleboro, Vermonto.

— Steĉjo Norvell

## Janet Warren (1914-2009)



**Janet ĉirkaŭata de kalgariaj esperantistoj dum Z-Festo de 2003 en ŝia domo**

La 30an de majo 2009 forpasis Janet Warren, longjara membro de la Esperanto-socio en Calgary. Janet esperantistiĝis en 1965. Kune kun Dorothy Hawley kaj Betty Salt, ambaŭ intertempe forpasintaj, ŝi gvidis la tiam florantan lokan grupon. Ŝi estis tutspeciale bona pianistino; kiam okazis la sukcesa kongreso de KEA en Calgary en 1975, ŝi estris la sukcesan koruson.

La ĉiujaraj kristnaskaj-zamenhofaj festoj en ŝia domo restos neforgeseblaj.


— Allan Simon

## Nia Enigmo

Dekstre: nova krucvort-enigmo de Don Reble; ĝian solveblecon jam kontrolis la Esperanto-Rondo de Edmontono.

La nomoj de tiuj kiuj sendos siajn solvojn al la redaktoro aperos en la sekva numero de ĉi tiu revuo.

Bonŝancon!



### Ŝlosiloj (r = radiko)

**Dekstren**

1 nek bestaj, nek vegetaĵaj
8 hejmlando de Bertilo Wennergren
13 provizas per iloj
14 ereto
15 atentiga interjekcio
17 inklinas
18 akiru kontraŭ mono
19 de ĉiu speco
21 senpatra knabo (r)
23 peceto (r)
24 malĝuste agu
25 en kia maniero
26 tiujn de ceremonia marŝo
29 popolo de Skotlando aŭ Irlando
30 egalaj partoj
31 de tiu speco
32 sangfiltranta organo (r)
33 dormilo (r)
34 parolsono (r)
35 komfortan kanapon
38 aĉetu portempe
41 iu objekto, afero
42 ruĝa aŭ blanka trinkaĵo (r)
43 meteor-ŝtonojn
45 voĉi vortojn (r)
46 arboj, malsanigeblaj per fungo identigita en Nederlando
47 vigle rapidigi (r)
48 fondanton de societo
51 relative multe
52 malnepo (r)
53 nehavanta prepozicio
54 ja bezonata (r)
55 kaŭzmontranta prepozicio
56 estigi (r)
57 nefalintaj akvogutoj (r)
58 rilata al 36-suben
59 trovarma sento (r)
60 semeroj (r)
63 fiaskas
67 honora respekto (r)
68 vojaĝfolieto (r)
69 trinkaĵo de folioj (r)
70 transflanke de
71 ano de plej vasta nacio (r)
72 komplika arkitektura stilo (r)
73 flagfloro (r)
75 konjunkcio de diferenco
76 ruĝa frukto (r)
77 alprenanto de naskotoj (r)
79 estis inda je io
80 ĉemarajn laborantojn

**Suben**

1 donas ekskluzivan rajton
2 malkonsentite
3 komencante subite
4 io por atingi celon (r)
5 mekanismon por speciala

efiko
6 ne kunpreni (r)
7 plej granda trefo (r)
8 dismeti sur surfacon (r)
9 promesegu
10 dromiceo (r)
11 tial
12 kurbo kiel elipso
14 senvaloraj
16 efikaĵo de atombombo
18 ter-mezur-unuo
19 ĉe ĉiu loko
20 laŭ ia maniero
22 re-prem-ŝovi (r)
24 tre malgranda
25 tre dolĉa planto (r)
27 interjekcio de doloro
28 mur-kavaĵo (r)
29 tre inteligenta homo
32 farendaĵo de aktoro (r)
34 nask-povan homon
35 plantos per ĵetado
36 plej maleeblan metalon
37 ĉiu de sama afero (r)
38 okupi hejmon (r)
39 entenanta sufikso
40 koncernantan ĉiun
42 serio de aĵoj (r)
43 tre supre
44 tiom da periodoj en hoke-ludo
45 meti al iu (r)
46 funtero (r)
49 kondiĉa subjunkcio
50 de iu
51 uzebla, facile kaj oportune
52 lignofonto
55 antaŭo de ŝipo (r)
56 ligna skatolo (r)
57 maro apud Egiptio (r)
58 malmola organo (r)
59 fabelulo (r)
60 diskutejo (r)
61 kordonu
62 aro de samaspektaj homoj (r)
63 surprizegiĝis
64 makulita klupeedo (r)
65 malsekigi per lango (r)
66 trafotaĵon
68 malhelpi iranton
72 ruĝa manĝebla radiko (r)
73 kisiloj (r)
74 malvira
76 proksimiganta partikulo
77 vi
78 moviĝi (r)

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## Koboldaĵo kaptita!

Kajmo Brent informis la redakcion ke **efika** preskoboldo ne-**etike** fuŝetis la version de la rezolucio de TAKE7 trovebla en la antaŭa numero de ĉi tiu revuo. La kongresanoj ja **ne** diskutis pri la neceso „por la esperantujaj organizoj ĉiunivelaj malfermi sin je **etika** kunlaborado kun neesperantistaj alternativmondaj organizoj“ sed pri la neceso „por la esperantujaj organizoj ĉiunivelaj malfermi sin je **efika** kunlaborado kun neesperantistaj alternativmondaj organizoj“.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## Solvo de krucvort-enigmo (aperis en *Lumo* 2008:2)

Ĉi-dektre: la solvo de la krucvort-enigmno aperinta en la pasinta numero de *Lumo*. La enigmo montriĝis pli malfacila ol antaŭvidite, kaj la redaktoro ricevis neniun plenan solvon, sed Bob Williamson trovis ĉiujn vortojn krom du. Gratulon al ĉiuj, kiuj provis solvi la enigmon!

| | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | S | I | L | A | B | | | | R | O | Z | A | N | | | |
| | A | K | U | T | | T | A | G | | P | A | L | | N | O | V | A | |
| | R | I | Ĉ | A | | U | N | U | F | O | J | E | | A | M | E | L | |
| I | D | E | A | L | | T | U | M | U | L | T | O | | L | A | R | I | K |
| K | O | N | S | O | L | O | | I | N | K | O | J | | I | D | A | R | O |
| S | | | | | | N | E | S | T | O | J | N | | Z | | | | L |
| O | R | D | E | N | O | | M | | | | | | L | I | T | O | V | O |
| N | E | O | N | O | N | | O | R | D | E | N | D | A | | O | F | E | R |
| | T | R | U | D | I | | C | | I | | O | | M | A | N | I | K | |
| | | M | | | | | I | N | K | U | B | | | | | C | | |
| | K | E | S | T | O | | I | | A | | L | | A | M | P | O | L | |
| V | I | T | O | | P | U | S | I | N | T | A | | G | A | L | J | O | N |
| I | N | U | N | D | I | | | | | | J | | I | R | I | N | T | A |
| D | | | | R | | K | A | V | E | R | N | O | | | | | | N |
| V | U | A | L | I | | A | B | A | T | O | | R | I | M | O | N | T | A |
| O | R | F | A | N | | R | E | G | A | N | T | A | | A | L | E | O | J |
| | B | E | N | K | | A | L | O | N | Ĝ | O | N | | R | I | T | M | |
| | O | R | G | I | | F | O | S | | U | R | Ĝ | | Ŝ | V | E | B | |
| | | | O | S | T | O | J | | | | N | A | Z | I | O | | | |

## Recenzo: *In the Land of Invented Languages*

***In the Land of Invented Languages [En la lando de inventitaj lingvoj]***. Arika Okrent. New York: Spiegel & Grau, 2009.

Mi neniam hezitas juĝi libron per ĝia kovrilo kaj tiu kovrilo estas tre promes-plena. La subtitolo estas (en Esperanta traduko): ***Esperantaj rokmuzikistoj, klingonaj poetoj, amantoj de la loglana, kaj la frenezaj revemuloj kiuj provis konstrui perfektan lingvon***.

Sur la paperkovrilo oni legas interne: "Preskaŭ ĉiu jam aŭdis pri Esperanto…" Legante tion, ĉu oni povas dubi la proksimecon de la fina venko?

Je la fino de la libro estas listo de 500 planlingvoj ekde Lingua Ignota de Hildegard von Bingen el la jaro 1150 ĝis Proto-Central-Mountain de J. Burke el la jaro 2007. Estas pli ol unu kanada kontribuaĵo; la plej lasta, Toki Pona de S. Kisa, kiu datas de 2001, estas n-ro 492 en la listo.

La verkisto interesiĝas ne nur pri la gramatiko de tiu aŭ alia lingvo sed volas scii kio motivigis la kreintojn kaj la subtenantojn de la lingvo. Ŝi notis ke kelkaj estis vere stranguloj. Konsideru Paulin Gagne la kreinto de Monopanglosse (1858), parizano kiu volis helpi algerianojn kiuj suferis de mort-malsato. Li proponis al francoj ke ili donacu la propran korpon, aŭ eble nur brakon aŭ kruron, por nutri la malsatantojn. Do ni ne plendu pri stranguloj en Esperantujo, kvankam en unu ĉapitro "Crank Pride" (Fiereco de Stranguloj) Okrent skribas pri Ivo Lapenna kaj lia klopodo respektindigi Esperanton.

La procedo de Okrent estas nekutima. Ŝi lernis Esperanton dum ses semajnoj kaj poste partoprenis kongreson de Esperanto USA kaj poste la Tutamerikan Kongreson en Havano. Ŝi ne fariĝis verda movadano, sed ŝi agnoskas ke ŝi havas simpation por Esperanto kaj esperantistoj. Samtempe ŝi gardas la profesian distancon dirante: "'Sukceso' verŝajne ne estas la unua vorto pri kio oni ekpensas rilate al Esperanto, sed en la eta pasia mondo de inventitaj lingvoj neniam estis lingvo pli granda."

Pro ŝia sperto en Havano ŝi ankaŭ konstatas ke Esperanto havas kulturon. Do, al niaj estontaj kritikantoj ni proponu tiun libron.

Ŝiaj taksoj estas pensigaj. Pri la Esperanto/ Ido-skismo ekzemple ŝi opinias ke ĝi helpis Esperanton, ĉar ĝi apartigis la lingvistojn kiuj interesiĝis pri la dezajno kaj la perfektigo de la lingvo disde la lingvo-uzantoj kiuj interesiĝis nur pri komunikado, la movado kaj la interna ideo. Ŝi substrekas ke la emo plibonigi kaj perfektigi neniam ĉesas kaj finfine la planlingvo fiaskas.

Okrent helpas nin meti Esperanton en pli grandan kuntekston. Ŝi diras: "Kio sekvas ne estas nur kolekto de rakontoj pri unuopaj lingvoj. La maniero en kiu homoj pensas pri lingvo estas influita per la epoko en kiu ili vivas, kaj eblas montri kiel ŝanĝantaj epokoj kondukas ĝenerale al ŝanĝo en la tipo de lingvoj ekpensitaj de la kreintoj… tiel ke la historio de inventitaj lingvoj estas la historio pri tio kiel ni pensas pri lingvo."

Oni povas legi kelkajn eltiraĵojn kaj vidi la liston de planlingvoj kun kelkaj ekzemploj ĉe la sekva retejo:

**wwww.inthelandofinventedlanguages.com**

— Detlef Karthaus

## Nova ĉe la libroservo de KEA

La libroservo de Kanada Esperanto-Asocio estis malpli uzata dum la lastaj jaroj fare de la membroj de KEA. Tial, la libroservo nun mendas malpli da libroj: ja ne estas racie konstante grandigi la inventaron se la libroj malpli vendiĝas.

Tamen, ni ĉiam estas pretaj mendi lernolibrojn kaj vortarojn, sciante ke tio utilas al komencantoj, kaj ankaŭ aliajn librojn laŭ viaj sugestoj.

Do jen kio novas ĉe la libroservo. Memoru ke vi ricevos **rabaton de 10% se vi estas membro**, sed **nepre indiku tion mendante**.

**Biblio**. La unua eldono de la Biblio nov-redaktita de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI sub la gvidado de B. Eichkorn kaj A. Kronenberger omaĝe al Adolf Burkhardt, la multjara prezidanto de la Ekumena Komisiono. Ĝi aperis kiel eksterordinara eldono de la serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA. La Biblio enhavas La Malnovan Testamenton en traduko de L. L. Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj en la traduko de G. Berveling kaj La Novan Testamenton en traduko de la Brita Komitato (J. C. Rust, B. J. Beveridge kaj C. G. Wilkinson). La Biblio estas presita sur fajna biblia papero kaj solide bindita. 1375 paĝoj. **Prezo: 33.00$**

**Esperanto per rekta metodo**. S. Marček. Internacia ilustrita lernolibro. Versio havebla en Esperanto, angla aŭ franca. Indiku kiun version vi volas. 110 paĝoj. **Prezo: 29.20$**

**Gramatiko de Esperanto**. M. Malovec. Eĉ grandaj komplikaĵoj de Esperanto estas klarigitaj per simpla kaj komprenebla maniero. La antaŭparolon verkis G. Mattos, prezidanto de la Akademio de Esperanto. 144 paĝoj. **Prezo: 23.00$**

**Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi**. H. Ulrich. Streĉa historia romano, plena de aventuro kaj emocioj. Ĝi estas ne nur rakonto pri dekunujara knabo, kiu iom post iom rimarkas kiu li estas, sed ankaŭ rakonto pri Florenco de Padzoj, Mediĉoj kaj Leonardo da Vinĉi. Ilustris Mirka Tomečková. 112 paĝoj. **Prezo: 17.50$**

**Rakontoj ne nur ŝercaj**. V. Vana. Ĉiujn rakontojn kunigas la "komikeco de la simpla tago", foje kreskanta ĝis absurdo. Kelkaj el ili devenas el la spertoj de la aŭtoro, kiu nelonge funkciis kiel gimnazia instruisto. Kvankam skribitaj dum la 60-aj jaroj de la 20-a jarcento – kaj certe senteblas el ili la atmosfero de la tiama erao – samtempe per sia bonhumuro kaj detaligado de iam sensencaj cirkonstancoj la rakontoj alproksimiĝas al la hodiaŭa leganto. Ilustraĵoj de Pavel Rak. 132 paĝoj. **Prezo: 17.50$**

**Sagao de Njal.** Tradukita el la islanda de Baldur Ragnarsson, FEL. Tiuj rakontoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktas la temon artisme, tiel oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn. 354 paĝoj. **Prezo: 25.30$**

**La Zamenhof-strato.** R. Dobrzyński. « Vere ĝi estas brila. Plaĉas al mi la glata kaj tre legebla stilo. » (H. Tonkin) « Mi legis multon pri la varsovia getto, sed la memoroj de la Nepo ebligas alispecan aliron kaj komprenon de la terura tempo. » (U. Lins). 287 paĝoj. **Prezo: 30.58$**

**DVD Esperanto estas…** Produktita de Edukado@interreto. La filmo, dividita je 6 partoj, estas rezulto de tri-jara projekto kaj estis kreita en internacia kunlaboro de pluraj film-emuloj. Profesia ilo por prezenti Esperanton, kun 20 subtekstaj lingvoj, 6 voĉaj lingvoj. Fortika plasta dovodujo. Pli-malpli 45 min. **Prezo: 8.70$**

**[Vidu la specialan oferton je paĝo 8!]**

**Libroj malpli novaj, eldonitaj en Kanado kaj ankoraŭ haveblaj :**

**Bestoj en nia domo**, Z. Metz, eldonis Esperanto-Societo Kebekia, Montrealo. 15 rakontoj originale verkitaj en Esperanto pri okazaĵoj en familio kun infanoj kaj bestoj. 60 paĝoj. Prezo: 10.00$

**Nanatasis**, R. Dutil; tradukis E. Brent, eldonis Esperanto-Societo Kebekia, Montrealo. Fabelo aktuala traktanta universalajn valorojn. 112 paĝoj. Prezo: 15.00$

**Pliaj novaĵoj pri la libroservo:**

Atentu ke la libroservo estos fermita de la mezo de junio ĝis la fino de aŭgusto 2009. Mendoj kiuj alvenas dum tiu periodo plenumiĝos en septembro.

Katalogo: Ne aperos nova katalogo en 2009. Vizitu la retejon de la libroservo por facile konsulti la retan katalogon kaj mendi: **www.esperanto.qc.ca/katalogo**

La reta adreso de la libroservo estas **libroservo@esperanto.qc.ca**

**Libroservo de KEA**
**6358 de Bordeaux**
**Montréal, Québec, H2G 2R8**

(Notu ke la libroservo havas nek telefonon nek faksilon.)

**Korespondi petas:**

Animaciajn filmojn en Esperanto mi volas fari. Tiucele mi studas animacion ĉi-jare ĉe filma lernejo. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj (kaj instruistoj) ke ja ekzistas homoj tutmonde kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto.

Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi ĉe la jena adreso:
**Simmon Keith Barney**
**1111 Pacific St, # 407**
**Vancouver, BC V6E 3X7**

**Redaktora angulo**



Kiel legantoj povas konstati laŭ la kovrilo de ĉi tiu numero, *Lumo* denun aperas tri fojojn jare. Por ke tro granda ŝarĝo tamen ne ripozu sur la ŝultroj de ties redaktoro, kies ekstermovadaj respondecoj ja ĉiukaze kaŭzas foj-fojajn prokrastiĝojn en la aperado de ĉi-revuo, ĉiu numero de *Lumo* denun havos nur 16 paĝojn. Iom kompense, la redakcio nun penos certigi ke la materialo de *Lumo* plejparte fluas rekte el la plumoj de kanadaj verkantoj kaj ne estos regurdaĵo de tekstoj troveblaj en aliaj periodaĵoj: la legantoj diris ke ili volas legi **originalajn** artikolojn en *Lumo* (vidu rezultojn de enketo en numero 2007:2) kaj la redaktoro aŭdis tion! Kompreneble, por ke tio eblu – kaj la revuo ne malfruu – necesas ke la kanadaj esperantistoj informu la redakcion de *Lumo* pri sia agado (movada, beletra, scienca…). Sendu do viajn kontribuaĵojn al: **Paul Hopkins < hoppaul ĉe gmail.com >**
**#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5**

# Kalendaro

## Regulaj kunvenoj en Kanado:

**Edmontono** (Alberto): Kunvenoj okazas preskaŭ ĉiun vendredon tagmeze kaj la duan ĵaŭdon de ĉiu monato ekde 19h30. Informoj ĉe **http://esperanto-edmonton.wikidot.com/**

**Halifakso** (Nov-Skotio): Oni kunvenas proksimume dufoje ĉiun monaton ĉe la hejmoj de grupanoj. Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/halifax**

**Kalgario** (Alberto): la Kalgaria Esperanto-Rondo kunvenas ĉiun lundan vesperon inter la 19h00 kaj 21h00 ĉe kafejo Second Cup en distrikto Kensington (338 – 10th Street NW). Informoj ĉe **http://esperantocalgary.blogspot.com/**

**Londono (Ontario):** Nova Esperanto-Klubo en Londono bonvenigas vizitantojn. Skribu al **Sally Madden** (adreso en la membrolisto) por ricevi informojn pri tempo kaj lokoj de kunvenoj.

**Montrealo** (Kebekio): la lastan vendredon de septembro, oktobro kaj novembro okazas la Montrealaj Esperanto-Kunvenoj; septembre en la restoracio Le Commensal (1720 St-Denis) ekde 19h00, oktobre kaj novembre en la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux) [se vi deziras partopreni la komunan manĝon, anoncu vin kelkajn tagojn pli frue kaj venu je 18h00 kun plado; alie, venu je 20h00]. Informoj ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites**

**Otavo** (Ontario): La Esperanto Rondo de Otavo kunvenas du fojojn ĉiumonate ĉe kafejo Bridgehead kaj la Universitato de Otavo. Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/ottawa**

**Toronto** (Ontario): Oni kunvenas ĉiun lundan vesperon ĉe kafejo Timothy's World Coffee ĉe stratoj College kaj Bay inter la 18h00 kaj 20h00. (Escepto: kiam lundo estas feritago, la kunveno okazas marde.) Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/toronto**

**Tri-Riveroj (Kebekio):** Nova klubo en Tri-Riveroj/Trois-Rivières bonvenigas vizitantojn. Skribu al **tririvero@esperanto.qc.ca** por ricevi informojn pri tempo kaj lokoj de kunvenoj.

**Viktorio** (Brita Kolumbio): Kunvenoj okazas en North Saanich ĉiun lundon de la 13h00 ĝis 14h00 en la domo de Olga kaj Wally du Temple kaj ĉiun ĵaŭdon de 13h00 ĝis 15h00 ĉe Golfludejo Ardmore, krom dum la somero. Informoj ĉe **http://esperanto.ca/victoria/**

## Nordamerikaj Esperanto-kunvenoj en la dua duono de 2009 (elektitaj):

**2-a de aŭgusto**

**Drumheller** (Alberto): Somera pikniko de la Kalgaria Esperanto-Rondo. Informoj ĉe **http://esperantocalgary.blogspot.com/**

**11-a ĝis 13-a de septembro**

**Sidney** (Brita Kolumbio): Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Kunveno (NOREK). Por ricevi informojn, skribu al **esperanto@shaw.ca**

**10-a ĝis 12-a de oktobro**

**Silver Bay** (Novjorkio): 16-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto. Informoj ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/are/**

**12-a de decembro**

**Montrealo** (Kebekio): Zamenhofa Festo de la montreala esperantistaro ĉe restoracio Le Commensal (1720 St-Denis). Informoj ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites**